

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni deziras saluti sinjoron Hans Breitenbach, kiu verkas por *Germana Esperanto-Revuo* kritikajn artikolojn pri la radio-programoj en esperanto.

A.- Tiuj kritikoj de sinjoro Hans Breitenbach rompas kun la tro ofta senkoloreco de nia kritik-literaturo. Tro ofte niaj recenzistoj kontentiĝas laŭdi aŭ silenti. Kiam sinjoro Hans Breitenbach ne samopinias kun radio-kronikisto, tion li malkaŝe, eĉ akre diras. Li provas tikli la kritikaton per ĵurnaleca titolo kaj konvinki la legantaron per lertaj asertoj.

Cl.- Ĉio tio atestas talenton de ĵurnalisto.

A.- Tamen en tiu talento ni malkovras iun atakemon, kiu pruvas mankon de matureco.

Cl.- Sinjoro Hans Breitenbach pere de la gazeto *Germana Esperanto-Revuo* direktis kontraŭ ni unu el siaj pafoj :

A.- Titolo : « *Pulĉinelaĵo el Svislando* ».

Cl.- Jen la komenco de tiu kritiko : « *25-a de marto, tagmeze, Svislando. Malofta oportuno por homo regule deĵoranta, tamen via monitoro kaptis ĝin forvojaĝonte al la kongreso en Aachen. Plej forte envenis la 31-metra emisio.* »

A.- *Nia jam pli frua konstato ankoraŭ validas: Dum lunde oni estas informata pri pli-malpli interesaj pure svisaj aferoj, la merkredaj emisioj ŝajnas aparteni pure al la Esperanto-movado, - fakto klarigebla nur per la supozo, ke la radiostacia direktoraro kvazaŭ lasas pulĉinelan liberecon almenaŭ al unu el la kunlaborantaj teamoj. »*

Cl.- Post tiuj tre afablaj vortoj pri nia laboro, al d-ro Arthur Baur kaj al mi mem, sinjoro Hans Breitenbach daŭrigas :

A.- « *Certe estas bone havi fortan Esperanto-voĉon en la etero, sed samtempe ni ekhavas malagrablan senton, kiam tiu forta voĉo traktas respektive marotojn kaj kverelojn pri lingvo kaj movado. »*

Cl.- Kaj sinjoro Hans Breitenbach riproĉas al ni kritikon, kiun ni direktis antaŭ unu jaro kontraŭ iu aspekto de la Helsinki-rezolucio. Kiel tro facile faras la ĵurnalistoj, li tendencas ĝeneraligi. Ĉar ni nin permesis kritiki unu tekston de UEA, sub la plumo de sinjoro Hans Breitenbach ni legas :

A.- « *Sinjoro Gacond ŝatas riproĉi al UEA trompon per certaj rezoluciaj formuloj. »*

Cl.- Jen novaĵo, ni, dumvivaj membroj de UEA, ŝatas riproĉi al UEA trompon.

A.- En sia konkludo sinjoro Hans Breitenbach revenas al la titola bildo :

Cl.- « *Kvazaŭ por kompletigi la pulĉinelaĵon, sinjoro Gacond fine diris : « Vi aŭdis kronikon el Svislando ». Jen eble la sola riverenco al la vera tasko de tiuj elsendoj. Sin trudas la demando : « Kiu estas pli granda trompanto, tiuj kiuj verkas UEA-rezoluciojn aŭ kelkaj el tiuj kiuj faras Esperanto-programojn de komercaj radio-stacioj ? La Gacond-aj eldiroj estus bonega frandaĵo por homoj serĉantaj materialon kontraŭ Esperanto. Tiamaniere oni povus absurdigi ĉian kongreson, parlamenton, konsilantaron ; ĉar eĉ tiuj prince pagataj reprezentantoj ja ofte ne povas fari ion alian ol ĝustatempe levi la manon dum voĉdonado. »*

A.- Tiel finiĝas tiu kritiko en kiu ni vane serĉis rebaton al nia argumentado. Anstataŭ kritiki ideojn sinjoro Hans Breitenbach kritikis la personecon de Radio-Svislando kaj de ties esperanto-kronikistoj. Kaj, kio estas eĉ pli grava, li provis senvalorigi la pozicion de la

parlamentanoj. Li vidas en tiuj elektitoj homojn « *prince pagataj* » por « *ĝustatempe levi la manon dum voĉdonado* ».

Cl.- Mi estas deputito en la Parlamento de mia kantono Neuchâtel, kaj mi respondos, ke mi neniam havis tiun impreson. Kiam mi voĉdonas, estas post longaj kunsidoj en la kadro de mia deputita grupo kaj post atenta aŭskultado de la argumentado de la ceteraj grupaj reprezentantoj. Demokrata vivo estas ebla, nur se oni respektas la funkcion de la parlamentanoj.

A.- Sed hodiaŭ ni ne deziras paroli pri demokrata vivo. Ni deziras reveni al la asertoj de sinjoro Hans Breitenbach kontraŭ Radio-Svislando.

Cl.- Unue li sciis, ke Radio-Svislando ne estas komerca radio-stacio. La kurtonda servo de la Svisa Societo de Radio-dissendado estis kreita por permesi al la svisoj, kiuj loĝas en foraj landoj aŭdi la novaĵojn el Svislando. Samtempe ĝi celis diskonigi eksterlandan svisajn vidpunktojn.

A.- Dum iuj epokoj, kiam Eŭropo estis dividita en du malamikajn naciojn, la voĉo el Radio-Svislando aŭdigis neŭtralajn vidpunktojn aŭ objektivajn novaĵojn, kiuj helpis multajn eŭropanojn vidi iomete pli alten ol la nacia plafono.

Cl.- Kaj kion faras esperanto en Radio-Svislando ? Ni memorigas al vi, ke en 1925 Edmond Privat fondis Radion-Genève, tio kun la helpo de esperantistoj kaj kooperativanoj. Kiam li forlasis Ĝenevon li estis elektita honora prezidanto de tiu Radio-Societo kaj li estis vokita kiel regula prelegisto. Tiam li iniciatis esperanto-kronikojn.

A.- Kun alia esperantisto, D-ro Arthur Baur, li iniciatis la esperanto-programon. Ili dividis inter si la laboron. D-ro Arthur Baur, kiu estas redaktoro, decidis paroli pri la svisa politika vivo kaj pri la svisaj kutimoj. Edmond Privat decidis paroli pri esperanto, neperforto, paco, mondanismo, pedagogio.

Cl.- En 1962 mortis Edmond Privat. Tiam anstataŭis lin profesoro Charles Ecabert, la prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando. Sed kelkajn semajnojn post la morto de Edmond Privat akcidente mortis lia posteulo.

A.- Tiam mia edzo, kiu estis sekretario de Esperanto-Edukistaro de Svislando, estis petita anstataŭi Charles Ecabert. Kaj li estis petita daŭre pritrakti porpacajn kaj priesperantajn temojn.

Cl.- Baldaŭ ok jarojn ni laboras. Neniam ni havis la impreson esti pulĉinelo. Kiel okazas en Svislando, ni ricevis plenan liberon por uzi la temon, kiu estas je nia dispozo.

A.- Ni nin neniam sentis trompantoj, kaj ni rifuzus ludi la rolon de blinda obeanto. Vi eble eksciis, ke en Svislando ne ekzistas preskontrolo. Ĉiu kronikisto estas propra kontrolanto. Kaj la vero estas nia juĝkriterio.

Cl.- Pro tio nia voĉo sonas en la etero. Pro tio ni havas multajn aŭskultantojn en multaj landoj. Se kelkfoje niaj vidpunktoj ne plaĉas al aŭdanto, tio ne rajtigas lin paroli pri maroto kaj kvereleco kaj diri, ke ni estas trompantoj.

A.- Tiuj atakoj tute certe pravas mankon de nuancemo. Pro tio ni nin permesis diri, ke la artikoloj de Hans Breitenbach respegulas mankon de matureco.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-